

ESPERANTO LANDO

Something for Every Member of the Family.

Io por Ĉiu Familiano.

III - a jaro. Marto - Majo 1932. N - ro 11.

" Toler - avido Kaj Kunlaborado
Por La Tuta Homaro "

Ĉefredaktoro: [Editor] JOHN BOVIT.

Redaktoroj:

WARREN H. GOULD. GEORGO SAVILLE.

Ĉefkunlaborantoj:

Julia Goldzier, B. C. Miller,

E. Channing Polk. Berthold Schmidt.

Ruth E. J. Seavey. Frank S. Templin.

H. M. Tylick. Lawrence A. Ware.

ESPERANTO - LANDO (kvaronjara)

10 cendojn aŭ .50 sviz. frk. unu numero

25 cendojn aŭ 1.25 sviz. frk. tutjara abono.

1 dolaron aŭ 5. sviz. frk. 5-jara abono.

Pagebla per respondkuponoj, aŭ per moneroj.

Redakcio kaj Administracio: 414 Springfield Avenue, Summit, N. J. Usono.

ESPERANTO LANDO, estante sendependa diskutejo, nek aprobas nek malaprobas la ideojn de siaj kunlaborantoj kaj korespondantoj. Ĉiu mem respondas pri la opinioj esprimitaj super sia subskribo.

Malgrandaj reklamoj, aŭ anoncetoj (nur antaŭpage) kostas po vorto 2 cendojn, minimume 25 cendojn.

Represo kaj tradukoj el Esperanto - Lando estas permesataj, nur oni bonvolu indiki la fonton, donante la plenan nomon, adreson, kaj abonprezon kaj al ni sendu du ekzemplerojn.

ESPERANTO - LAND is published by Universal Esperanto Fraternity, Inc., 574 Jersey Avenue, Jersey City, New Jersey, U.S.A. Published quarterly, 10 cents a copy, 25 cents a year, \$1. for 5 years.

The Esperanto Fraternity School meets every fourth Saturday of each month from 6 to 9 P. M. at above address.

LONDON: Fera Kalkanumo. El la angla originalo tradukis George Saville.

362 Paĝoj. Bindita. \$1.10

Sennacieca Asocio Tutmonda, Kolmstrasse

1, Leipzig, 027, Germanujo. aŭ

Esperanto - Lando.

ENHAVO

Paĝo

Kvaron - Jaro

73

In the Magazines

75

Sfero de Libroj

76

III Olimpiaj Vintraj Ludoj

77

La Historio de Homaro

78

Niaj Humoraj Samtempuloj

81

6 - hora Labor - Tago

82

Negoca Situacio.

82

Debato: Sussmuth kontraŭ Saville

JUNULOJ AL LA ŜTATISTOJ.

Parolado al la Mond-Senarmiga Konferenco, Geneva, 2-an de Februaro, 1932.

de James Frederick Green,

Yale Universitato 1932, Reprezentanto de la Nacia Studenta Asocio Senarmiga Usona.

"Post meditado pri la okazaĵoj, kiuj antaŭiris la katastrofon de 1914, ni restas nekonvinkitaj pri la saĝo de niaj antaŭuloj . . . Ni respektas la noblajn milit - mortintojn, sed ni dubas la juĝon de tiuj, kiuj estas prirespondaj por ilia morto.

"Organizita buĉado, ni elkomprenas, ne solvas disputon; ĝi nur silentigas argumenton.

"La aliaj parolantoj havas multon riski; ni havas eĉ pli, ĉar ni absolute batalas por niaj vivoj. Mi staras antaŭ vi, kvazaŭ advokato pro la defendo petante prokraston de la ekzekuto. Estas mia generacio, kium oni vokos cedi ĉion, kion ni konsideras valorinda en la vivo por ke estigi cel-tabuloj por la kugloj de la maŝin-pafiloj, kaj viktimoj de la plej nova gaso venena. Estas la junaj geviroj de mia aĝo, kiuj estos ordonitaj sin mortigi. Estas mia generacio, kium oni ordonos detruiri la plej bonan kulturon homan, eble civilizon mem, por kaŭzoj kiujn la estontaj historiistoj eltrovos eraraj, se ne tute stultaj kaj efektive malvirtaj. Ni sekve perdis intereson preparigi por kanona nutraĵo.

"En unu senco mi prezentas ultimaton pli ol peton. Malantaŭ viaj primeditadoj staras rigardante nin, fantomo de morto. Ni deziras vivi, kaj vivi en paco. Ni volas konstrui mondan socion provizantan liberecon, egalan ŝancon kaj senton de sendaĝero. Ni volas realigi al ĉiu homo, plenan evoluon de lia personeco en terminoj de la plej altaj homaj kaj spiritaĵoj valoroj, kiujn ni scias.

Esperantigis Julia Goldzier.

NOBEL PAC-PREMIO.

Decembro 1931. Fraŭlino Jane Addams de Chicago kaj D-ro Nicholas Murray Butler de Kolumbia Universitato ricevis la 1931 Nobel Premion Pac-an, kiel rekonon por siaj klopodoj por establi amikecon kaj konkordo inter la nacioj. La sumo estas 40 mil dolaroj dividota inter la du premiitoj. La ricevitoj de tia premio estis Theodore Roosevelt, Elihu Root, Woodrow Wilson, Charles G. Dawes, kaj Frank B. Kellog.

Fraŭlino Addams estas pacifistino dum longa tempo. En Oktobro 1931, ŝi kondukis grupon por prezenti al Prezidanto Hoover, skribpeton kun 150,000 nomoj virinaj, postulante limigadon de armado. Ŝi donis sian parton de la premio por subteni la laboron de la Internacia Ligo de Virinoj por Paco, de kiu ŝi estis prezidantino dum longa tempo.

D-ro Butler rekomendis pac-planojn kaj estas la ĉefo de Karnegi Dotado por Internacia Paco. (Carnegie Endowment for International Peace.)

SCIENCO.

Decembro 26. Profesoro Albert Einstein kaj lia edzino alvenis ĉe Pasadena, Kalifornia. La profesoro intencas elesploradi ĉe la Kalifornia Instituto de Teknologio, de kiu institucio D-ro Robert A. Millikan, la fama fizikisto, estas la ĉefo, kaj ĉe la Monto Wilson Observejo, en kiu institucio D-ro Edwin Hubble estas stabano.

Januaro 1932. D-ro Michael I. Pupin, la inventisto de elpensajoj pri radio kaj telefono ricevis la John Fritz oran medalon, la plej gravan honoron de la inĝeniera profesio en Usono. Li venis al Usono de Jugoslavio. Li diris, "La manko de amo inter la homaro malebligas la ĝuadon de la nuntempa progreso ekonomia."

Januaro 1932. D-ro Edwin W. Rice Jr., pioniro de elektro, ricevis la Edison medalon, gravan honoron de elektra inĝenierado. Li konstatas, "Por restarigi prosperon, ni devas uzi la samajn sciencajn rimedojn, por kontroli kaj ekvilibri produktadon proporcie al konsumado, kiujn ni uzas por pliiĝi produktadon de varoj."

Juĝisto Oliver Wendel Holmes ekŝiĝis pro maljuneco de la Usona Superega Kortumo. Li havos 91 jarojn la 8-an de Marto, 1932. Prezidanto Roosevelt nomis lin al tiu posteno la 8-an de Decembro, 1902, kiam li estis membro de la Superega Kortumo de Massachusetts. Li estas liberalulo kaj tial li ofte malkonsentis je la kortum-decidoj.

AVIADO

Novembro 1931. Bert Hinkler, aŭstraliano, transflugis la sudan Atlantikon de Natal, Brazilo, al Bathurst, Brita Gambria, Afriko, dum 22 horojn.

[Daŭrigita sur paĝo 83]

ESPERANTO-KLUBO "HARMONIO"

meets the Third Saturday of each month
at 7:15 P. M.
at Spencer Arms Hotel, Broadway and 69th,
St., New York City. Visitors are invited.

CLASS TO LEARN ESPERANTO

held every Tuesday at 8 P. M. at 119
West 57th Street, Suite 620, New York
City. Visitors are invited.

IN THE MAGAZINES EN LA REVUOJ

ESPERANTO.

Holiday of the International Auxiliary Language, Esperanto, in Cracow and Warsaw by Z. Cooper, in THE JEWISH DAILY FORWAR, September 6, 1931 Section two, page 4.

Aspostles of World Unity, XXXII, Ludwik Zamenhof by Lidja Zamenhof, in WORLD UNITY MAGAZINE of 1931 November, on pages 84-88.

International Language by Helen S. Eaton, in WORLD UNITY MAGAZINE of 1931 November, on pages 89-93.

An Interview with Jens Schjerve about Esperanto, by A. J. Liebling in the NEW YORK WORLD-TELEGRAM of November 5, 1931, page 12.

World Language by H. M. Rayner in CANADIAN FORUM of January 1932 on pages 135-6.

Photograph of Mr. and Mrs. M. Inouye of Tokio Japan. Mr. M. Inouye is an esperantist and passenger agent for the Japanese Government Railway. An interview with him relating Esperanto, in THE HERALD of Miami, Florida, February, 20, 1932.

ESPERANTO NEEDED FOR THE LEAGUE OF NATIONS

A delegate from a northern European country relates the following incident concerning a motion which he introduced at a recent meeting of an important commission of the League of Nations: "My secretary had carefully prepared the French translation of my speech advocating the motion. I read from the manuscript without faltering. But after I had finished a delegate arose whose native language was one of the two official languages of the League, and in eloquent thunder thrust my arguments aside, I wished to reply and point out his errors. But how could I? To freely and correctly speak without preparation in the foreign language was more than I could manage. To interrupt the proceedings long enough to prepare my rebuttal was out of the question. My proposal was voted down. From now on I shall support Esperanto, so that all representatives can meet on an equal footing. It is the only fair solution."

From Esperanto, U. E. A.

PROGRESS OF ESPERANTO

The city of Cannes, a winter resort having a population of about 30,000 and being situated in the southern part of France, decided to use Esperanto on its traffic signs. All signs on posts and walls will give the same information in the French and Esperanto languages.

The Chamber of Commerce of Paris invited the Universal Esperanto Congress to meet in Paris in 1932. This is the 24th congress. It will meet from July 30 to August 6th.

The 12th SAT. Congress will be held in Stuttgart.

The cities of Barcelona and Amiens gave the name of Zamenhof to streets.

The First International Congress of Tourists in Budapest decided that the organization committee of the next congress shall consider the use of Esperanto for tourists.

The University of Liverpool added Esperanto to its official language courses.

The first congress of Internacia Proleta Esperantistaro will be held in Berlin July 30.

LA SFERO DE LIBROJ THE SPHERE OF BOOKS

La redakcio tre volonte publikas kontraŭopiniojn, koncerne kiun ajn aperintan recenzon. La lebroj, ĉi tie menciataj kaj recenzataj, estas haveblaj ĉe la librofako de nia eldonejo.

USONA LITERATURO ELSTARANTA DUM 1931.

Funebro Fariĝas Elektra, (Mourning Becomes Electra) de Eugene O'Neill. Ĝi estas tragedio, kiu estas la plej bona el la verkoj de la aŭtoro, kaj ĝi aldonas honoron al la dramo usona. Alla Nazimova kaj Alice Brady ludis impresive la rolon de Sinjorino Mannon kaj Lavinia en tiu tragedio.

Mallonga Momento, (Brief Moment) de S.N. Behrman. Ĝi estas agrabla komedio inteligenta.

Kalendaro de Pekoĵ, (A Calendar of Sin) de Evelyn Scott. Tiu romano estas longa rakonto interesege pri malsaĝegeco de la homa raso.

Racio kaj Naturo, (Reason and Nature) de Morris R. Cohen. Ĝi estas klasiko de usona penso.

Vivante Mian Vivon, (Living My Live) de Emma Goldman. Ĝi estas alloga rakonto de unu el la famaj ribelantinoj konsekvencaj.

Vaŝingtona Karuselo, (Washington Merry - Go - Round) de anonimulo. Tiu libro respegulas la personojn, kiuj funkciigas nian nacian registaron.

El la Nacio (The Nation) eldonita semajne en 20 Vesey Str. Nov York Urbo. 15 cendojn po numero. \$5. tutjara abono.

Esperantigis John Bovit

REFORMO DE LA PUNJURO.

Profesoro D-ro Eduard von Liszt, defendanto de pun procesoj en Vieno, laboras nun je nova verko, aperonta post nelonge. La verkanto prezentas en tiu ĉi libro siajn ampleksajn spertojn pri la afektivigo de la punjura praktiko kaj faras proponojn pri forigo de multaj malbonaĵoj. D-ro Eduard von Liszt dum multaj jaroj laboris kiel juĝisto kaj prokuroro.

SOPHIE CIPERA

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ.

De Pastro B. C. Miller.

(Daŭrigita de paĝo 64)

1. Ne, sed ni devas konservi "agnoski" por la senco "ignori", kaj anstataŭ ĝin per "akcepti", kiam ĝi tion signifas.

2. Jes.

3. En la frazo: La pilko resaltis de la tero, la "re" ne signifas, ke la pilko reiris al la loko de kiu ĝi venis; sed oni volus diri, ke la pilko iris for de la loko, kie ĝi frapis.

RESPONDOJ DE JOHN BOVIT.

1. La Plena Vortaro difinas agnoski: "akcepti kiel leĝa, aŭ justa, aŭ vera." Anstataŭ uzi "agnoski", mi uzos "akcepti kiel vera." "Agnoski" estas senutila vorto en nia lingvo, ĉar ni povas esprimi tiun sencon en tri vortoj de la Universala Vortaro Zamenhofa. Legu "Internaciaj vortoj. Ĉu ili havu plian spacon en Esperanto?" De Leim Tjong Hie, Semarang, en 1932 Februaro, Esperanto de U. E. A. paĝo 42.

2. Legu Kompletan Gramatikon de Fruictier paragrafojn 53, 54, 55, 135, 136.

3. "Re" montras revenon aŭ ripeton. Legu Lingvajn Respondojn de Zamenhof paĝon 25.

III OLIMPIAJ VINTRAJ LUDOJ, LAGO PLACID EN NOV - JORKO.
 III OLYMPIC WINTER GAMES, LAKE PLACID IN NEW YORK.

Februaro 4-13, 1932.

de E. Channing Polk.

En Februaro okazis afero, kiun oni povus nomi, "La Mondmilito de Frateco." Lertaj reprezentantoj de dek-kvin nacioj, havante altan estimon unu por la aliaj, eniris la Olimpiajn Ludojn. Je la unua tago, guberniestro Roosevelt solene malfermis la konkursojn. Oni aranĝis la flagojn de la diversaj nacioj en unu multkolora amaso, kiu estis tiel entuziasma al la spirito kiel belega al la okulo. Tiam la ludoj komencis sur la neĝo kaj glacio, dum la varme vestitaj orkestranoj ludis, "En la Bona Malnova Somertempo."

La plej altaj honoroj, laŭ punktoj, falis sur la usonanoj, eble ĉar ili posedis la plej grandan nombron da enirantoj. En kelkaj unuopaj konkursoj usonano montris la plej altan lerton, kiu donas pli multe da ĝojo al la usona popolo ol la gajnado de la plej granda nomda nombro da punktoj.

El la tuta nombro da punktoj, Usono gajnis 103, kaj Norvegujo, la dua, gajnis 77, La ceteraj nacioj sukcesis en la jena ordo:- Kanado, Svedujo, Finnlando, Aŭstrujo, Germanujo, Francujo, Svisujo, Hungarujo, Rumanujo, Pollando, Italujo, Belgujo, kaj Ĉeĥo - slovakujo.

Du usananoj, Sinjoroj Shea kaj Jaffe, kiuj loĝas en la sama ŝtato Nov-Jorko, gajnis ĉiun konkurson en rapidglitado.

Estis tri konkursoj en figurglitado, unu por la viroj, unu por la virinoj, kaj unu por viro kaj virino glitantaj kune. Sinjoro Schafer, de Aŭstrujo, gajnis la unuan; Fraŭlino Henie, de Norvegujo, gajnis la duan; kaj Sinjoro kaj Sinjorino Brunet, de Francujo, gajnis la trian.

La du ludoj, kiuj tenis la plej grandan intereson por la vidantoj, estis sledado kaj skiado, ĉar tiuj estis la plej danĝeraj. Usono gajnis ĉiujn konkursojn en la unua el ĉi tiuj, kaj ĉiuj honoroj en la dua iris al Svedujo, Noregujo, kaj Finnlando. La vidantoj akklamis Sinjoron Grottnumsbraaten, de Norvegujo, pro sia treege alta salto, kiu donis al li la venkon en tiu konkurso.

Ni esperu, ke tiaj pacaj bataloj, en kiuj la venkatoj gratulas la venkantojn, kaj la venkantoj volas al la venkatoj, "Pli bonan ŝancon en la estonto," estos la solaj internaciaj militoj, kiujn niaj idoj iam vidos.

THE AMERICAN MERCURY
 EDITED BY H. L. MENCKEN

What Is Going on in the World. Articles on Current Issues. Americana.
 Arts and Sciences. Music Room. New Books.
 Published monthly \$5.00 a copy. \$5.00 a year.
 730 Fifth Avenue, New York City.

CURRENT HISTORY
 History In The Making.

Articles On Current Problems. A Month's World History. Books of The Month. Current History in Cartoons. Published monthly. 25 cents a copy.
 \$3.00 a year. Times Square, New York City.

LA HISTORIO DE HOMARO. THE STORY OF MANKIND.

de Hendrik Willem Van Loon
Elangligis Georgo Saville.

Ĉapitro 63.

(Daŭrigita de pago 68)

ŝercojn kaj komikaĵojn. Observu la rigardantaron proksimafoje kiam vi havos ŝancon. Kelkaj personoj, ŝajnas, kvazaŭ enspiras la vortojn. En daŭro de sekundo ili povas legi la citaĵon. Aliaj estas iom malpli rapidaj. Al ankoraŭ aliaj daŭras 20 ĝis 30 sekundoj. Kaj fine, tiuj homoj kiuj ne legas pli ol ili povas helpi, kaptas la ideon nur tiam kiam la pli spritaj inter la rigardantaro estis jam komencintaj deĉifri la sekvantan linion. Same okazas en homa vivo, kiel mi tuj montros al vi.

En antaŭa ĉapitro mi estis dirinta al vi kiel la ideo de la Roma Imperio kontinuis vivi 1000 jarojn post la morto de la lasta romana imperiestro. Tio kaŭzis la starigon de granda nombro da "imit-imperioj". Ĝi oferis al la episkopoj romanaj ŝancon por iĝi estroj de la tuta Eklezio ĉar ili reprezentis la ideon de romana mond-supereco. Tio pelis nombron da tute senofendaj ĉefoj barbaraj al krima kariero kaj senĉesa milito ĉar ili estis ĉiam sub la sorĉo de tiu magia vorto "Romo". Ĉiuj tiuj homoj -- papoj, imperiestroj kaj ordinariaj bataluloj -- ne estis tre diferencaj ol vi kaj mi. Sed ili vivis en mondo en kiu la romana tradicio estis vivograva afero -- io vivanta -- io kio estis klare memorata de la patro kaj la filo kaj la nepo. Kaj tiel ili luktis kaj dediĉis sin al afero kiu hodiaŭ ne povus allogi al si eĉ dekduon da aliĝintoj.

En ankoraŭ alia ĉapitro mi diris al vi kiel la grandaj militoj religiaj okazis pli ol jarcenton post la unua ago malkaŝa de la Reformacio kaj se vi komparus la ĉapitron pri Tridek Jara Milito kun la ĉapitro pri Inventoj, vi tiam ekvidus ke tiu terura buĉado okazis je la tempo kiam la unuaj fuŝaj maŝinoj estis jam spiregantaj en la laboratorioj de kelko da francaj, germanaj kaj anglaj sciencistoj. Sed la mondo ĝenerale ne interesiĝis je tiuj strarĝaj elpenaĵoj kaj ĝi daŭrigis la grandajn teologiajn diskutojn kiuj hodiaŭ kaŭzus nur oscedojn sed ne koleron.

Mil jarojn de nun la historiisto estos uzanta la samajn vortojn pri Eŭropo de la forpasinta 19-a jarcento kaj estos vidanta kiel homoj estis okupiĝantaj pri teruraj bataloj naciecaj dum la laboratorioj ĉirkaŭ ili estis plenaj da seriozaj homoj kiuj tute ne zorgis pri politiko, tiel longe kiel ili povis devigi naturon ke ĝi cedu kelkajn pli el sia miliono da sekretoj.

Iom post iom vi ekkomprenos kiom mi volas diri. La inĝeniero, la sciencisto kaj la kemiisto estis en daŭro de generacio plenigintaj Eŭropon, Amerikon kaj Azion per siaj karbo-gudro-produktaĵoj. Ili kreis novan mondon en kiu tempo kaj spaco estis reduktitaj al malgravaĵoj. Ili inventis novajn produktaĵojn kaj ili faris ilin tiel malkare ke preskaŭ ĉiu povas ilin aĉeti. Ĉion tion mi jam diris al vi sed ne domaĝus se oni ripetus.

Por funkciigi la ĉiam grandigantan nombron da fabrikoj la posedantoj, kiuj estis ankaŭ iĝintaj la reĝantoj de la lando, bezonis krudaĵojn kaj karbon. Precipe karbon. Dume, la amaso popola estis ankoraŭ pensanta per terminoj de la 16-a kaj 17-a jarcentoj kaj firme teniganta al la malnovaj ideoj pri la ŝtato kiel dinastia aŭ politika organizo. Tiu fuŝa institucio mezepoka estis tiam subite devigata trakti la alte modernajn problemojn de meĥanika kaj industria mondo. Ĝi faris tion, tiel bone kiel ĝi povis, laŭ la reguloj kiuj estis difinitaj antaŭ jarcentoj. La diversaj ŝtatoj kreis grandegajn armeojn kaj gigantajn militŝiparojn kiujn ili uzis por akiri novajn posedaĵojn en malproksimaj landoj. Kie ajn restis eta peco da tero, tie ekstaris angla aŭ franca aŭ germana aŭ rusa kolonio. Se la indiĝenoj kontraŭis, oni mortigis ilin. Plej ofte ili ne kontraŭstaris, kaj oni lasis al ili vivi en paco; kondiĉe ke ili ne malhelpis al la diamant-minejoj aŭ la kar-minioj aŭ la petrol-putejoj aŭ la or-minejoj aŭ la kaŭĉuk-plantejoj, la indiĝenoj akiris multajn profitojn pro la alilanda okupado.

De tempo al tempo okazus ke du ŝtatoj, je sia serĉado al krudaĵoj deziris la saman pecon de tero samtempe. Tiam eksplodis milito. Tio okazis antaŭ 15 jaroj kiam Rusio kaj Japanio militis pro posedo de iu teritorio kiu apartenis al la ĉina popolo. Tamen tiaj konfliktoj estis esceptaj, vere neniu volis militi. Ja, la ideo por batali per armeoj kaj militŝipoj kaj submarŝipoj iĝis absurda al la homoj 20-jarcentaj. Ili rilatigis la ideon de perforto kun la forpasinta epoko de absolutaj monarkioj kaj intrigantaj dinastioj. Ĉiutage ili legis en siaj gazetoj pri ankoraŭ pliaj inventoj, pri grupoj da anglaj aŭ usonaj aŭ germanaj scienculoj kiuj estis kune laborantaj je perfekta amikeco por la celo de progreso je medicino aŭ je astroromio. Ili vivis en aferoplena mondo de komerco kaj fabrikoj. Sed nur kelkaj ekvidis ke la evoluo de la ŝtato, (de la giganta komunumo popola kiu agnoskas iujn komunajn idealojn) estis kelkcent jarojn malantaŭen tiriganta. Ili provis averti la aliajn. Sed la aliaj estis okupataj per siaj propraj aferoj.

Mi uzis tiom da komparoj ke mi devas peti vian pardonon pro enkonduko de unu plia. La Ŝipo Ŝtata (la malnova kaj fidinda esprimo kiu estas ĉiam nova kaj ĉiam pitoreska) de la egiptoj kaj la grekoj kaj la romanoj la venecianoj kaj la komercist-aventuristoj de la 17-a jarcento estis fortika ŝipo, konstruata el bone hardita ligno kaj komandata de oficiroj kiuj konis same sian anaron kiel sian ŝipon kaj kiuj komprenis la limojn de la arto naviga kiu estis transdonita al ili de iliaj prauloj.

Poste venis la nova epoko de fero, ŝtalo kaj maŝinaro. Unue unu parto de la malnova ŝipo ŝtata, poste alia, estis ŝanĝitaj. Ĝies dimensioj estis grandigitaj. La velojn oni forĵetis kaj metis en ilian lokon vaporon. Pli bonaj loĝejoj estis instalitaj, sed pli da viroj estis devigataj iri en la hejtruon, kaj kvankam la laboro estis sekura kaj sufiĉe profita, ili ne ŝatis ĝin tiel bone kiel sian malnovan kaj pli danĝeran laboron ĉirkaŭ la mast-starigilaro. Fine, kaj apenaŭ perceptebla, la malnova kvadrat-ŝipo estis transformita en modernan pak-ŝipon oceanan. Sed la kapitano kaj liaj oficiroj restis la samaj. Ili estis aŭ nomataj aŭ elektataj same kiel antaŭ cent jaroj. Oni

la samaj. Ili estis aŭ nomataj aŭ elektataj same kiel antaŭ cent jaroj. Oni instruis al ili la saman sistemon navigadan kiu estis utila por la maristaro 15-jarcenta. En iliaj kajutoj pendis la samaj ĉartoj kaj signal-flagoj kiuj estis servintaj en la tagoj de Ludoviko XIV-a kaj Frederiko la Granda. Koncize, ili estis [ne pro sia propra kulpo] tute malkompetentaj.

La maro de politiko internacia ne estas tro vasta. Kiam tiuj imperiaj kaj koloniaj pak-ŝipoj ekpenis superi unu la alian je kurado, oni ne estus povintaj eviti akcidentojn. Ili okazis. Vi ankoraŭ povas vidi la rompaĵon kiam ajn vi preterpasas tiun parton de l'oceano.

Kaj la moralo tiurakonta estas simpla. La mondo ege bezonas homojn kiuj prenis sur sin la novan gvidecon -- kiuj havus la kuraĝon al siaj propraj vizioj kaj kiuj klare agnoskus ke ni estas nur ĉe la komenco de la vojaĝo kaj ke pro tio ni devas ellerni tute novan sistemon navigadan.

Ili estus devontaj servi dum jaroj kiel nuraj metilernantoj. Ili estus devontaj trabori sian vojon ĝis la supro kontraŭ ĉiaspeca opozicio. Kiam ili estus atingintaj la ŝip-estrandon, ribelo de envia anaro povus kaŭzi ilian morton. Sed unu tagon homo ekstaros kiu alĝvidos la ŝipon sekure al la haveno, kaj li estiĝos la heroo de l'jarcentoj.

KIEL POR ĈIAM ESTOS.

"Ju pli mi pensas pri la problemoj de nia vivoj, des pli mi konvinkigaŭs ke ni elektu Ironion kaj Kompaton kiel niajn ekspertizistinojn kaj juĝistinojn, same kiel la antikvaj egiptoj vokis al la diino Iziso kaj la diino Neftiso (Nephtys), por siaj mortintoj.

"Ironio kaj Kompato estas ambaŭ bonaj konsilantinoj, la unua per siaj ridetoj agrabligas la vivon; la dua sanktigas ĝin per siaj larmoj.

"La Ironio kiun mi alvokas ne estas kruela diaĵo. Ŝi mokas nek amon nek belon. Ŝi estas ĝentila kaj afabla. Ŝia gajeco senarmigas kaj estas ĝi kiu instruas nin ridi je friponoj kaj malsaĝuloj, kiujn, se ne pro ŝi, ni, pro nia malforteco, estus malestimantaj kaj malamantaj."

Kaj kun tiuj saĝaj vortoj de tre granda franco mi adiaŭas vin.

8 Barrow strato, Nov-Jorko.

Sabaton, la 26-an de junio, XXI.

* El latina, Bradypodidae. Besto havanta tri fingrojn ĉe ĉiu piedo. Ĝi estas maldiligenta, mallaborema, malenergia. (trad.)

BILDARO LAŬ EKZERKARO

from SPOKEN ESPEARNTO for beginners. 10 copies for \$1. 100 copies for \$5.

Norman W. Frost Brownfield, Maine.

LA DEVENO DE ESPERANTO.

de L. L. Zamenhof, Tradukita de Henry W. Hetzel, Prezidanto de Esperanto-Asocio de Norda Ameriko. Paralela teksto Esperante kaj Angle. 24 paĝoj. 10 cendojn.

Esperanto - Asocio de Norda Ameriko, 1591 Anderson Avenue, Fort Lee, N. J. Usono.

NIAJ HUMORAJ SAMTEMPULOJ.

OUR HUMOROUS CONTEMPORARIES.

Kompilis kaj Esperantigis Viktor Klinton.

KIAL HOMOJ RIDAS?

57. Ridado venas kun ĝojo kaj triumfo. Ridado aperas ĉe la evito de tragedio kaj morto. Akcidento tombigis karb-ministojn dum 20 tagojn. Kiam oni savis ilin, tiuj ministoj ridegis.

Ridado signifas felicon. Simioj en best - gardenoj ridegas, kiam ili vidas la alvenon de sia ŝatata gardisto. Ne estas vera la diraĵo de Aristotelo, ke nur homoj ridas.

La esenca elemento de humoro estas surprizo. La signalo de humoro estas ridado.

D-ro Logan Clendening.

58. La temo de Predikanto estas "modereco." Buda skribis, ke la plej grava vorto en iu lingvo estas "anim - trankvilo." Sankta Paŭlo predikis, ke la plej grava afero estas "amo." Benjamin Franklin konstatis, ke la plej grava virto estas "laborado." Bankisto diras, ke la plej grava idealo, ne estas fariĝi klera, rica, fama, potenco, eĉ nek morala, sed la plej grava idealo estas fariĝi radianto de sano, ĝojo, trankvilo, kuraĝo, kaj bonvolo.

59. Li "Ĉu mono estas pli esenca ol amo por igi feliĉan geedziĝon?"
Ŝi: Ne, ambaŭ estas egale esencaj."

60. Nov - edzo: "Mia edzino ŝatas kafon por matenmanĝo, sed mi ŝatas teon."

Malnov - edzo: "Baldaŭ vi kutimiĝos al kafo."

61. "Kiel statas la banka negocado?"

"Neniu prunte prenas ĝenon en la nunaj tempoj," respondis la bankisto.

62. Doktoro: "Kiel vi statas hodiaŭ matene?"

Malsanulo: "Kiom kostus, se mi respondus tiun demandon?"

63. "Ekzistas unu afero por kiu ni devas esti dankema."

"Kion vi volas diri?"

"Ke niaj amikoj ne posedas la aĵojn, kiujn ni ne kapablas aĉeti."

64. Instruistino: "Kiom da ostoj vi havas en via korpo?"

Wilĉjo: "Naŭcent."

Instruistino: "Tio estas pli multe ol mi havas!"

Wilĉjo: "Mi manĝis fiŝon por lunĉo."

THE WORLD TOMORROW

A Journal Looking Toward a Social Order Based on the Religion of Jesus.
Editorials. Articles on Current Topics. Not in the Headlines. The Book End.

Findings. Published monthly. 25 cents a copy. \$2.00 a year.

52 Vanderbilt Avenue, New York City.

6-HORA LABOR-TAGO KAJ 5-TAGA LABOR-SEMAJNO.

"Se modernaj plibonigoj industriaj ne bilanciĝas per la malpliĝado de labor-horoj ni havos konstantan pliĝon en teknologia senlaboreco."

Amerika Federacio de Laboro. D-ro John Dewey.

1. Mekanika muziko en kinematografejoj eksigis 108 muzikantojn, aŭ 60 procentojn de la muzikantaro, en la teatroj en Vaŝington, D. C., ĉeestitaj de blankuloj, kaj eksigis 21 muzikantojn, aŭ 91 procentojn de la muzikantaro en la teatroj de tiu urbo, ĉeestitaj de malblankuloj. La nombro de la funkciigistoj de la kinematografoj ne pliigis post la enkonduko de la mekanika muziko. 1931 Novembro Labora Revuo, paĝo 1.

2. Maŝino, kiu fosas fosaĵon, funkciigita de unu laboristo kune kun helpanto, fosas tiom dum unu horo, kiel 44 laboristoj fosas per man-fosiloj. 1931 Decembro Labora Revuo, paĝo 1.

3. Maŝinoj en la cigara industrio duobligis la produktadon po laboriste. 1931 Decembro Labora Revuo, Paĝo 11.

4. La anstataŭigo de la ciferplato telefono por la mansistemo malpliigis du-trionojn da ŝancoj por okupigo por funkciigistoj. 1932 Februaro Labora Revuo.

Esperantigis John Bovit.

NEGOCA SITUACIO.

Negoca Situacio en Usono Resumita de Departementoj de la Registaro de Usono kaj de aliaj Aŭtoritatoj. Mezo 1923 - 5 estas 100 procentoj. Aranĝis John Bovit.

Negoc - semajno indekso de meza	1931		1932
	Novembro	Decembro	Januaro
Negoca aktiveco	66	64	62
Bankrotaj	a 2,195	2,758	3,458
Pasivoj ĝiaj, en 1,000 dolaroj	60,650	73,213	96,860
Bankaj ĉesigoj, de Federal Reserve	a 42	82	87
Deponoj ĝiaj en 1,000 dolaroj	40,714	133,007	100,638
Bankaj ĉesigoj, ne aliĝitaj al F. R.	127	271	247
Deponoj ĝiaj en 1,000 dolaroj	42,695	186,282	174,773
Bank - Debetoj en milionoj da dolaroj			
(A) ekstere Nov - Jork Urbo	14,605	17,112	15,893
(B) en Nov - Jork Urbo	14,464	19,233	17,676
Bankaj prunt - donoj kaj diskontoj			
Ŝarĝvagonoj uzitaj	68	69	64
Eksportado, en milionoj da dolaroj	193	183	149
Importado, en milionoj da dolaroj	149	152	135
Produktado de seg - ligno	30	27	27
Konstruaĵo - Kontraktoj, en milionoj da dolaroj			
(A) ĉiuj specoj	151	137	85
(B) hejmaj	45	36	27
Landovendado	59	64	57
Okupigo	69	69	68
Nombro de laboraj disputoj je la komenco de la monato	56	51	63
Nombro da laboruloj, kiuj partoprenis	12,611	5,118	10,146
Kosto de vivo	83	83	81
Prezo de koton, meza kvalito, Nov-Jork po funto	\$.06	\$.06	\$.06
Prezo de kupro, elektrolitema po funto	\$.06	\$.06	\$.07
Prezo de tritiko po buŝelo			
Akciaj prezoj de ĉiu grupoj, 404	71	57	58
Obligaciaj prezoj, 50 obligacioj hejmaj.	91	88	88
Rentuma procento, tempa mono			
a Aktuala nombro dum la tuta monato.			

Tio estas la unua flugado en tiu loko.

Doktoro Raimund Nimfuhr en Vieno estas sciencisto, kiu dediĉas sian vivon al meteorologio, fiziko, kaj aviado. Jam en 1923 li eldonis sian verkon, "Kiel Ĉiuj Homoj Flugos." Post tridek-jara esplorado li sukcesis atingi sian sopiratan celon. Li konstruis flugmaŝinon, kiu ne povas renversigi nek falegi, kiu sin levas kaj alteriĝas vertikale, kies prezo ne estos pli alta ol tiu de bona motorbiciklo kaj malmultekosta dum funkciado. La flugmaŝino kapablas flugi, laŭ plaĉe, rapidege kiel la nuntempaj aviadiloj aŭ malrapide. Ĝi povas halti kie ajn en la aero. Ĝi povas sen uzo de sia motoro, ŝparante la materialon, gliti kiel veloŝipo tra la aero. Ĉiu estos sia propra piloto. Dum ĉi tiu somero la nova aviadilo estos preta.

Sophie Ciperá.

SENARMIGA KONFERENCO EN GENEVO.

Februaro: Francujo proponas, ke la Ligo de Nacioj havu armeon, al kiu ĉiu lando donu soldatojn kaj batalilojn, ke aviado estu sub la kontrolo de la Ligo de Nacioj; ke oni ne uzu submar-ŝipojn kaj gasojn venenajn.

Britujo sugestas, ke oni malpliigu nunajn batalilojn je 25 procentoj, kaj ke oni ne uzu submar-ŝipojn kaj gasojn venenajn.

Usono favoras jene: la daŭrigadon de la nunaj ŝiparaj traktatoj, pluan ŝiparan malpliigadon, forestigi submar-ŝipojn, limigadon de tankoj kaj de facil-movaj pafilegoj, forestigi la uzon de gasoj venenaj, kaj de obusoj ĝermigitaj, ke oni aere ne bombadu civitanojn, kaj aliajn projektojn.

EKLEZIO.

Januaro 24, 1932. Socia Serva Dimanĉo en Episkopaj preĝejoj. Specialajn preĝojn por la senlaboruloj kaj por la paco de la mondo oni diras en la preĝejoj tra la tuta mondo. La ĉef-oficejo estas en 281 Kvara Avenuo, Nov-Jorko Urbo.

EKSTER LANDAJ AFEROJ.

Novembro, 1931. Esterlanda Ministro Grandi de Italujo venis Usonon por konferenco kun Prezidanto Hoover kaj J. P. Morgan. Antaŭ li vajagis hejmen, li diris "Mi favoras la limigadon de armiligado kaj interkonsenton per arbitracio."

Januaro 1932. La japana armeo per forte transpasas Manĉurion. Usono sciigis al Japanujo, ke ĝi malkonsentas la malpliigadon de Usonaj rajtoj, la fermon de la porde al Ĉinujo, la rompado de ĉina sendependeco kaj lando, kaj iun rezultaton, kiu estus kontraŭ la Kellog traktato, kiu malkonfesas militon, kiel nacian planon.

KONGRESO.

Decembro 1931. La Kongreso de Usono malfermis. La Ĉambro de Reprezentantoj konsistas el 220 reprezentantoj de la Demokrata Partio kaj el 208

WORLD UNITY.

The emergence of new and higher values in philosophy, science, religion, ethics, and the arts from the alembic of universal unrest represents the focal point of vision for World Unity Magazine.

Published monthly. 25 cents a copy \$2.50 a year.

4 East 12th Street, New York City.

reprezentantoj de la Respublikana partio. La reprezentantaro elektis John H. Garner el Texas, Demokraton, antaŭsidanton de la Ĉambro de Reprezentantoj.

La Kongreso konfirmis la pag - prokraston al la usona registaro de aliaj registaroj. Ili aldonis, ke ili malkonsentas la malpliigon aŭ la nuligon de tiuj ŝuldoj.

LABORISTOJ.

Novembro 1931. Nov-Jork -Urbo penas kolekti 18 milionojn da dolaroj por helpi siajn 8000,000 senlaborulojn. Preskaŭ ĉiu urbo kolektas monon por helpi siajn senlaborulojn.

18,000 karb-ministoj strikas en Kentucky. Theodore Dreiser, romanisto, esploris tiun strikon kaj raportis, parte, ke la salajro de la ministo estas proksimume 30 dolaroj po monato en kvazaŭ-mono, kiun la ministoj devas uzi en butikoj poseditaj de la karb-kompanioj.

Februaro 1932, 8,000 marŝuloj iris al la Urba Domo de Nov - Jorko Urbo kaj postulis senpagajn ĉambrarojn, mangĵojn, k. t. p.

Dungitoj de super 200 fervojoj konsentis akcepti malpliigon de siaj salajroj je 10 procentoj. Aliaj metioj faras saman.

La Unuigitaj Min-laboristoj de Ameriko (United Mine Workers of Amerika) en sia kunveno ĉe Indianapolis alprenis jenajn rezoluciojn: urgis la registaron de Usono obteni la industriojn, kiuj estas bazo de la vivo, kaj inter kiuj ne ekzistas konkuradon; reguli la karbindustrion; rekomendis ke laboristoj studu leĝdonadon pri asekuro kontraŭ senlaboreco.

John Bovit.

KAZIMIERZ SMOGOREWSKI, Pol-Pomeranio. El la franca lingvo tradukis S. Grenkamp - Kornfeld. Kun 22 kartoj entekste kaj 4 plurkoloraj ekster tekste. La plej interesa studo pri la pola - germanaj rilataj. 1931. 136 paĝoj. 25 X 17 cm. Broŝurita. Prezo 60 cendojn.

Havebla ĉe **Esperanto - Lando**, aŭ

S. GRENKAMP, PARIS - 14, 117, Bd Jourdan, France.

DEBATO.

"Decidite, ke la propogand maniero de E. A. N. A. estas efika kaj kapabla atingi sian celon, la universalan uzon de Esperato kiel helplingvon internacian."

J. J. SUSSMUTH, jesanto.

GEORGO SAVILLE, neanto.

BERTHOLD SCHMIDT, antaŭsidanto.

24 - an de Majo, 1932, je 8 - a horo vespere, 119 W. 57th St.,
ĉambro 620, New York City.

